Ирина Саверьевна Алексеева ,

Odo al Samarkando

tradukita de Manfred Retzlaff

laŭvorta Esperantigo de la germanigo

Mi kantas al vi, ho Samarkand'
Tiun ĉi kanton. Vi restis tiel juna.
Vi estas konata en la tuta mondo.
Kiu vin vidis, tiuj devas vin ami.

Profeto vin iam antaŭvidis
En sonĝo antaŭ longa, longa tempo,
Kaj Temerlan' vin konstruis
En via tuta majesteco.

Kaj viaj sanktaj haloj, trezorejo
De l' arto kaj de l' instruo,
Jarcentojn ili jam staras tie,
Kvazaŭ apenaŭ pasis tempo.

Tie ĉi la poeto Navoi
Estas kantinta pri amo kaj forto,
Kaj liaj kantoj ankoraŭ neniam
En tiu lando tute estas forsonintaj.

La kupoloj de la minaretoj tie ĉi,
Ili lumas tage kiel nokte la steloj.
Per la dekoro de iliaj ornamoj
Ili salutas ĉiun jam de fore.

Ho Samarkand, urbo de l' saĝeco!
Tie ĉi staras preĝejoj kaj moskeoj,
Kai tiu, kiu vin konas, tiu diras,
Ke en la mondo li vidis nenion pli belan.

Ho Samarkand, floru kaj prosperu!
Via gloro disfamiĝu ĉie,
Kaj eterne nepereema estu!
Ankaŭ estonte nin akompanu!

...

Ирина Саверьевна Алексеева ,

Ode to Samarkand

tradukita de Malcolm Jones

I sing of you, oh, Samarkand'!
Your wondrous features win my praises.
And your dear heart - the Registan -
seems young to me and never ages.

Its steady beating Ulughbek
could sense beneath the constellations.
Oh, Samarkand! Immortal pick
of mighty Tamerlan's creations.

Madrasses are your sacred schools,
which cultivate the arts and learning.
Their beauty overcomes time's rules
by centuries into moments turning.

Here the great Navoi's verse,
so full of love and strong emotion,
is cherished by your populace,
made happy by its inspiration.

The domes of minarets stand proud -
like day-time stars in clear sky shining:
so pure the blue, without a cloud
and fine the spires in art combining.

Oh, Samarkand! You're wise through age,
with mosques and churches closely neighboured.
For those who love you, the world's stage
has no town better nor more favoured.

Oh, Samarkand! Live long and thrive,
be glorified by each good action!
And while eternity's your prize,
be here our lasting benefaction.

...

Traduko de la Rusa poemo "Ода Самарканду" de Ирина Саверьевна Алексеева en Esperanton de Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2013-03-25.*

Arg-860-1736 (2013-03-26 17:48:13)

Traduko de la Rusa poemo "Ода Самарканду" de Ирина Саверьевна Алексеева en la Anglan de Malcolm Jones.

Arg-860-2037 (2014-10-16 20:52:12)

Tiu ĉi poem-angligo aperis en 2013 en libro "Ода Самарканду" (= Odo por Samarkando). Sinjoro Malcolm Jones, kiu angligis la poemon, estas brita esperantisto. Lia adreso troviĝas en la UEA-jarlibro de la jaro 2014 sur paĝo 126.